



ESPERO KATOLIKA



KARAJ LEGANTOJ

La antaŭan monaton mi jam atentigis pri la fakto, ke multaj abonantoj ankoraŭ ne pagis sian kotizon por 1961: intertempe nur 2-3 pagis! Envenis artikolo „Vekiĝu!” por la rubriko „Parolas la Leganto”. Mi tre petas precipe la forgesemulojn, atente legi ĝin. Ne timu, mi ne publikigos la nomojn de ŝuldantoj, sed mi vere havas kialojn por plendi. La du tagojn de escepte suna semajno-fino mi uzis por esplori kiuj ĝis nun ne pagis kaj noti iliajn nomojn kaj adresojn por sendi admonilojn: bedaŭrinde pro la tempo kaj la kostoj! Krom dekduo kiu ne pagis eĉ por 1960 estas nepagintaj por 1961: Brazilo 17, Francujo 21, Germanujo 41, Hispanujo 18, Italujo 22, Nederlando 23, kaj multaj landoj kun malpli ol 12 nepagintoj. Mi tre urĝe petas al ĉiuj, almenaŭ tuj post ricevo de admonilo pagi, por ne denove forgesi tiun por vi eble bagatelan, sed por ni tre necesan aferon. Kaj ĉar la jaro baldaŭ finiĝos, bonvolu se eble samtempe pagi por 1962, por eviti la danĝeron, denove forgesi kaj esti admonata, kio ja neniam estas agrabla afero.

Pri ekŝiĝoj: mi bone povas kompreni ke oni devas ekŝiĝi se ankaŭ la eĉ malalta kotizo estas tro multe, sed tio estas escepta kaj en tiu kazo ni povos aranĝi la aferon el donacoj de oferemaj samideanoj, se la koncerna abonanto tamen tre ŝatas daŭre ricevi nian revuon. Sed multaj kiuj ne plu havas intereson por nia afero, eĉ ne estas tiel ĝentilaj, almenaŭ frutempe sciigi tion, ili daŭre akceptas nian revuon, kiu ja kostas al ni monon — la presisto kaj la poŝto ne laboras senpage! — ĝis mi devas streki ilin post kelkaj admonoj.

La verkinto de suprenomita artikolo sugestas, informi ĉe la ekŝiĝintoj pri la kialo de la ekŝiĝo: niaj propagandistoj, niaj fervoraj reprezentantoj kaj via redaktorino regule skribas al tiuj personoj, sed nur tre escepte ricevas respondon! Mi parolas pri fervoraj reprezentantoj; jes, la plej multaj estas fervoraj, eĉ tre fervoraj, sed kelkaj preskaŭ neniam skribas kaj estas eĉ unu, kiu en longa tempo ne informis min pri la stato de la aferoj; jam plurfoje mi skribis lin, sed li silentadas en ĉiuj lingvoj kaj mi eĉ ne scias kiuj membroj pagis al li por ĉi tiu jaro, do ankaŭ ne povas sendi admonilojn. Mi ne volas menci nomon, almenaŭ ankoraŭ ne, sed esperas ke li nun baldaŭ plenumos sian libere elektitan devon aŭ cedos sian lokon al persono, kiu havas tempon kaj emon por almenaŭ 3-4 foje en jaro skribi al mi kelkajn liniojn pri la stato de la afero.

Tre, tre mi bedaŭras, ke mi devis ĝeni vin ĉiujn per miaj plendoj, kiuj fakte estas destinitaj por „nur” 200 personoj: sed vi certe samopinios kun mi, ke mi ne povis pli longe silenti.

Tamen estas ankaŭ bonaj aferoj: la kunlaboro de multaj kiuj ensendis artikolojn por plifaciligi mian redaktoran laboron; la simpatiaj leteroj de legantoj, kiuj estas kontentaj pri enhavo kaj aspekto de nia revuo; la mondonacoj por helpi nian laboron kaj la samkredanojn en nepagipovaj landoj; eĉ mi povis enskribi denove dumvivan membron: personoj kiuj disponas pri sufiĉe da mono povas tre efike subteni nian laboron, fariĝante Dumviva Membro kaj ili evitas al si mem la penon, ĉiujare forsendi la kotizon!

Truus Durenkamp.



LKK-sekretariino :
 F-ino Elena Cipriani,
 Via R. Bonghi 34
 ROMO — Italujo.

KVARA BULTENO DE LA L.K.K.

★ ★

Ĉe la fino de julio, limdato de la unua rabato, la rivereto de la aliĝoj al nia 29-a rapidiĝis. Dum kelkaj tagoj la ondoj kurante ŝaŭmis, sed iom post iom la pligrandiĝinta rivereto reaperis trankvile fluanta. Sed jam la sciigoj estas sufiĉe

disvastigitaj: la akvoj ne plu stagnos. La enlistiĝitoj estas 141 el 15 nacioj. Kvankam ni travivas tagojn tre danĝerajn, tamen eĉ el la plej malproksimaj landoj, eĉ el la plej maltrankvilaj, alvenas aliĝoj al nia Kongreso. Tio estas kuraĝiga, ĉar klare montriĝas, ke la popoloj rifuzas kredi neevitebla militon, kiu hodiaŭ estus universala detruo; sed ili esperas, ke post tiom da elektroŝarĝitaj nuboj denove sereniĝos. Sendube, inter la unuaj eŝperantaj pli bonan mondon, kiel ne estu ni, elektinte kiel kongresejon la *Centron „Pio XII”*, kiu ĝuste pro tiu programo ricevis sian nomon?

Romo akceptos la katolikajn eŝperantistojn en la kadro de la plej impona mondro de sia katolikeco. La *Ekumena Konsilo* vokos ĉirkaŭ la Papon la plej grandan kvanton de ekleziaj eminentuloj, okazigos neforgeseblajn spektaklojn de religiaj ritoj, kiuj per ekstera pompo strebas esprimi al Dio tion, kion la vortoj ne kapablas. Unu post la alia, la grandegaj romaj preĝejoj brilos en la sungloro de la ekumeno; la plej gravaj trezoroj de la kredo, de l'istorio, de l'arto, kutime s'ngarde kaŝitaj, estos konvene videblaj. Romo, kiu jam en aliaj okazoj sciis grandioze ricevi milionojn da vizitantoj, surmetos sian plej belan veston en tiu tempo.

Tamen la Ekumena Konsilo ne estos distriĝema, sed kontraŭe invitos ĉiun al profundo de la Kredo, al kontemplado de la Vero. Ni do povas esperi, ke la ctoso de l'Urbo oferos al ni la plej bonajn, eble unikajn okazojn por ĝui samtempe la spiritajn kaj materiajn vidindaĵojn; la LKK nepre ĉion faros, por ke la tre diversaj gustoj de la parteprenontoj trovu en la neelĉerpebla riĉo de Romo ĉion, kion ili prave deziras.

Ni simple citos kelkajn el la plej notindaj lokoj: *Romaj Forumoj*, *Panteono*, *Koloseo*, *Varmbanejoj de Karakalla*, *Katakomboj*, preĝejoj de ĉiu epoko kaj stilo, renesancaj palacoj, barokaj vilaoj, modernaj konstruaĵoj, *Vatikano* — la muzea urbo — kaj apudaj vilaĝoj *Ostia*, *Tivoli*, k.t.p.

Sekve de multaj petoj, nia tuttaga ekskurso celos al la franciskana urbo *Asizo*, en la verda regiono *Umbria*, kiu de la Sanktulo konservas nedifektitajn ctoson kaj tradicion. Trankvila kaj luma je siaj montetoj kronitaj per

Renkontoj por la junularo

Aŭtuna Esperanto-Renkontiĝo en LA SAGNE apud LA CHAUX-DE-FONDS, Svislando okazos 21 kaj 22.10.1961. La programo estas varia kaj alloga; je la dimanĉo tamen estas organizita nur protestanta diservo kaj ĉar ni eĉ ne scias ĉu troviĝas tie katolika preĝejo, ni nepre devas rekomendi al eventualaj katolikaj partoprenontoj, ke ili antaŭe petu informojn pri tio. Cetere la renkonto estas organizita por pruvi la uzeblecon de Esperanto; oni ankaŭ aranĝos ekspozicion UNO kaj ĝiaj fakaj organizoj — Esperanto en la lernejo. Ni deziras grandan sukceson.

Adreso: S-ro Claude Gacond, instruisto, La Sagne NE, Svislando.

TEJO organizos la 7. *Skiferiojn* kaj la 5. *Skikonkursojn de TEJO*, de 26.12.61 - 28.1.62, en la raviga *FILZMOOS* ĉe la Drahenstejnmontaro, *Salzburg, Aŭstrujo*. Petu programon kaj detalojn ĉe *Lic phil. Heinrich Reiter Kocher, Van der Nüllgasse 100/10/15, WIEN X, Aŭstrujo*.

ALĜERIAJ RIFUĜINTOJ, MILITVIKTIMOJ!

En Maroko kaj Tunezio restadas nun proksimume 300.000 rifuĝintoj el Alĝerio. Ilia situacio feliĉe pliboniĝis. Ili nun ricevas nutraĵon de la internacia Ruĝa Kruco kaj la prizorgo de ilia sano estas pli bona. Tamen la loĝa situacio estas ankoraŭ tre malbona. Multaj el la rifuĝintoj devas vivi en kavoj kaj en truoj en la tero, kovritaj de branĉoj aŭ plektita herbo.

Esperantistoj helpis ĉe la plibonigo de la situacio de la rifuĝintoj. La helpalvoko por ili en diversaj Esperantaj gazetoj havis bonan sukceson.

Jam pli ol 100.000 kilogramojn da *uzitaj vestoj* estas ricevataj en Nederlando kaj senditaj al la Alĝeriaj rifuĝintoj. Plej multe de la vestoj estas en tre bona stato, multaj eĉ tute novaj. Laŭ raporto de la delegitaro en Maroko de la internacia Ligo de Ruĝa Kruco Unuiĝoj, kiu prizorgas la distribuon, oni ricevis ankaŭ sendaĵojn de uzitaj vestoj i.a. de la Monda Konsilantaro de Eklezioj en Londono, kaj de la Ruĝaj Krucoj de Svedujo kaj de Kanado.

Por la distribuo, la Ruĝa Kruco dungis 21 virinojn jam nur en *Casablanca* kie la uzitaj vestoj alvenas. Tamen dum la lasta vintro la Ruĝa Kruco povis per la venintaj vestoj plenumi nur 59% de la bezono de la rifuĝintoj en Maroko. Oni do ankoraŭ multe bezonas. En Nederlando vi sendu viajn uzitajn vestojn somerajn kaj vintrajn al S-ino v. Leeuwen, Zocherstr. 60, tel. 82074, Amsterdam-W, en aliaj landoj al la suprenomitaj organizoj.

olivarboj kaj ermitejoj, riĉa je naturaj kaj artaj belaĵoj, ĝi akceptos la gekongresanojn en atmosfera de paco. Survoje ili havos un'kan eblon rigardi la mondfaman spektaklon de la „*Marmore*“-akvoĉaloj, kiuj sin ĵetas varie kaj sovaĝe el 165 metra alto. Plue ili vizitos *Spoletto*, ĝentilan urbon mezepokan kun belaj palacoj kaj preĝejoj, nun vigla sidejo de studoj kaj kongresoj, de arto kaj spektaklo.

Se ĉiuj lokoj tre memorigas pri la spirita revolucio de S. Francisko, neniel la memoroj grandiĝas kiel en *Asizo*, la urbeto kiu naskis lin kaj sanktan Klaran, lian fidelan sekvantaron. Ĉio restis pura kaj simpla. Juveloj de valora krono: sankta Maria de la Anĝeloj sube (kun la kapelo de la „*Porziuncola*“) kaj supre la Baziliko de sankta Francisko, triumfo de arto kaj kredo.

Praktikajn sciigojn pri ĉio ĉi oni donos ĝustatempe.

LA EKLEZIO EN LA MONDO

LA EKLEZIO KAJ LA MISIO

Misiologia Semajno pri la nekristanaj religioj, aŭgusto 1961

Pli ol 250 personoj, inter kiuj grupo da Afrikanoj, partoprenis la 31-an Misiologian Semajnon en *Loveno (Belgujo)* 22-25.8.61. Dum tiuj ĉi tagoj oni pritraktis en la enkondukoj kaj diskutoj la temon de la nekristanaj religioj. En sia malferma parolado la sekretario de la kongreso *patro J. Masson* opiniis, ke la Eklezio sur afrika tero devos formi afrikan figuron. Por realigi tion estas i.a. tre utile pristudi la nekristanajn sektojn.

Gravan referaton atestantan pri profunda pristudo elparolis *Dom G. Guariglia*, profesoro en la etnologio al la universitato de Milano. Por eviti la malfavoran signifon de la vorto „sekto” li uzis la priskribon „profetaj savatendantaj movadoj”. En sia studo li analizis kaj komparis 256 da tiaj movadoj: 90 en Oceanio, 100 en Ameriko, 62 en Afriko kaj 8 en Azio. Kiel malproksime ajn estante de unu al alia en tempo kaj spaco, ili tamen liveris en kompara analizo serion da rimarkinde konformaj karakterizaj signoj. La profesoro profunde parolis pri la profetaj-mesiaj tendencoj en ĉi tiuj movadoj. Profeta kaj mesia savatendoj certe ne estas privilegio de tiel nomataj altkulturoj. En ĉiu tempo kaj ĉe ĉiu popolo oni trovas tiun ĉi fenomenon. Precipe en la tiel nomataj evolulandoj ŝajnas ekzisti post la kontakto kun la civilizacio de la blankuloj social-kultura kaj religia klimato, en kiu profetaj savatendantaj movadoj trovas facile nutran teron. Pligrandiĝinta kaj plifortiĝinta memkonscio certe rilatas al ĝi. En tiuj ĉi movadoj oni multfoje ne atendas bone priskribitan Savonton, se ne sub influo de la Kristanismo kaj la Islamo. Oni ofte vidas la savon en eksternormalaj okazoj. Kiel kaŭzojn de estiĝo de ĉi tiuj movadoj la parolanto vidis unue la influplenajn social-kulturajn kontaktojn kun la Eŭropa civilizacio. Ankaŭ politikaj motivoj estas gravaj. El la esploro montriĝis ĉiea malamo kontraŭ la blankuloj. En la plimulto de la kazoj tiu ĉi malamo estas la bedaŭrinda pruvo de granda seniluziiĝo koncerne la civilizacion de la blankuloj. Oni devas sincere konfesi, ke, kvankam la eŭropa civilizacio donis ankaŭ multajn avantaĝojn kaj bonojn, la metodoj de la eŭropa civilizacio kaj de la alkulturiĝo tre ofte ne estas akcepteblaj, precipe en Afriko kaj Azio. Oni do povas kompreni, ke multe da tiuj ĉi movadoj montras klaran tendencon al plifirmiĝanta rackonscio. Kiel tria kaŭzo estas rimarkinde, ke tiuj ĉi movadoj trovas sian inspiron kaj kreskan medion en la religio. Pli forta alvoko al la propeto de iliaj mortintaj praavoj kiel perantoj al Dio — rimarkinda signo de preskaŭ ĉiuj tradiciaj religioj — kuniras kun ĝi.

En la kontakto kun Kristianismo kaj Islamo nekristanaj elementoj evidente miksiĝis kun kristanaj ideoj. Psikologie oni trovas partan klarigon por la estiĝo de tiuj ĉi movadoj en la profunda maltrankviligo pri la atako de ilia spirita praava heredo. Ĝis nun ne montriĝis, ke la eŭropa civilizacio povas doni sur tiu ĉi tereno sufiĉan kompenson. La junaj generacioj en la evolulandoj estas pli malmulte inklinaj al tiu ĉi pesimismo kaj ankaŭ pli malmulte maltrankviligaj. Ili pli facile akceptas la nuntempan situacion kaj rimarkas tiam, ke la nura teknika civilizacio ne donas plenan homan liberigon.

Dum la interparoloj post tiu ĉi enkonduko la afrikanoj akcentis, ke la afrikano en la kontaktoj inter afrika kaj eŭropa civilizacioj malofte faras elekton ekskludantan unu de la alia. Pli ol la eŭropano supozas, la afrikano miksas diversajn civilizaciajn elementojn, kie la eŭropano estos elektinta sen pardono.

Kiel malfacile estis ricevi komprenon precipe pri la religia aspekto de tiaj movadoj kaj serĉi la renkontiĝan momenton kaj la vojojn de adapto por la misia laboro, montriĝis el diversaj tre interesaj enkondukoj, kiel de la japanologiisto patro *Henri van Straelen S.V.D.* pri la *Tenrikyo-movado* kaj de la teologiisto *D-ro J.M.S. Salgado* pri la religioj en *Haïti*. Estas kiel la svisa misiologiisto *Prof. D-ro J. Beckmann* konkludas, ke la Kristanismo staras ankoraŭ sur la sojlo de la vera religia renkontiĝo de la Eklezio kun la nekristanaj religioj kaj, ke la analizo kaj kompreno pri la nekristanaj religioj certe ne ankoraŭ estas kompletaj.

Pli pozitiva sono aŭdigis *Msro J. Jadot, Direktoro de la Papaj Misiolaboroj en Belgujo*, en sia prelego pri la Eklezio en Kongo, dum la ferma kunsido de la kongreso. Ĉie ĉe la katolikoj en Kongo oni rimarkas pli intensan religian vivon ol antaŭe. Montriĝis ekz., ke la meza kvalito de la kandidatoj por seminarioj kaj monaĥejoj depost la pasinta jaro estas rimarkinde pli alta; multe pli puraj religiaj motivoj superas. La konga pastraro neatendite rapide lokita en ĉiuspecaj gvidantaj funkcioj, laboras bonege. Ili laboras alie ol iliaj Eŭropaj kolegoj: malpli laŭ fiksitaj skemoj, sed en fleksebla adapto al vivado kaj pensado de la bantuhomo. Okazas en Kongo grandega revolucio, ankaŭ en la tiea Eklezio. La antaŭaj okcidentaj kernoj pecetiĝas: estas kresko al Afrika Eklezio, pli ol antaŭ kelka tempo oni pensis ebla. Kompreneble tio ĉi donas problemojn, sed tiuj estas ĉiam ligitaj al pozitive evoluanta transira krizo.

LA EKLEZIO KAJ LA EKUMENA MOVADO

„Lernejo en ekumeneco”, paroltemo de la partoprenintoj al la 11-a „Pax Christi” piedirado, aŭgusto 1961.

Ĉiun jaron la internacia „*Pax Christi*”-movado, kiu naskiĝis post la 2-a mondmilito el la francaj rezistintoj kontraŭ la hitlera reĝimo, kun la celo labori por la paco de Kristo, organizas piediradon de 12 tagoj. La unua okazis en 1952 en Italujo kaj havis kiel centron *Assisi*.

Ĉijare patro *P.P.J. Verkoelen O.M.I.*, landa religia prizorganto de la „*Pax Christi*”-movado en *Nederlando*, estis la organizanto de la 11-a internacia pilgrimado en tiu ĉi lando. 600 personoj, grandparte junaj homoj en la aĝo de 20 ĝis 30 jaroj, el 17 landoj partoprenis la piediradon okazintan en preskaŭ ĉiutaga pluvado, donaco de la nederlanda klimato! Tamen ĉies animstato estis bonega! En dek grupoj la pilgrimantoj foriris el diversaj lokoj kaj post dek tagoj ili kune alvenis en *Den Bosch (Boskoduko)*, marŝinte ĉiutage distancon de 15 ĝis 20 kilometroj.

Kiel preparolota temo *Patro Verkoelen* elektis la praktikan ekumenekon, ĉar ĝuste en *Nederlando* granda kunlaboro inter katolikaj kaj protestantaj kristanoj forte estas kreskinta dum la lastaj jaroj. Tial ankaŭ protestantoj partoprenis la pilgrimadon kaj multe da partoprenantoj pasigis la nokton en la gastama rondo de protestanta familio. Tiel la dektaga piedirado metis bazon por vere kristana frateco inter katolikoj kaj protestantoj.

La 26-an de aŭgusto ĉiuj grupoj kunvenis en *Den Bosch*, kie ankaŭ ĉeestis *Kardinalo Alfrink* kaj *Msro Bekkers*, episkopo de tiu ĉi urbo. La kardinalo kore alparolis la pilgrimantojn en diversaj lingvoj. Dum la solena dankceremonio en la katedralo de Sankta Johano la lastan tagon, li instigis: „Vi spertis la kristanan interligecon. Klopodu ĉiuj esti mesaĝantoj de la paco!” Kun tiu ĉi mesaĝo kaj kun bela memoro pri spirite tre fruktodonaj tagoj ĉiu reiris al sia lando. Sekvontjare la piedirado okazos en *Svisujo*.

La 46-a Universala Kongreso de Esperanto en Harrogate

Ne estas eble, doni eĉ nur tre koncizan raporton pri ĉiuj eroj de la grandioza manifestacio, okazinta en la brita urbo *Harrogate* de 5-12.8.1961. Okazis kunvenoj kaj ekskursoj, etaj kongresoj de la diverstendencaj fakaj organizoj, Somera Universitato, Arta Festivalo, Infankongreseto ktp. ktp.

La kongresanojn oficiale akceptis la urbestro de Harrogate, s-ro *Kons. Frank Allum*, kiu alparolis kaj regalis ilin la unuan tagon, sabate en la Teatro.

Dimanĉmatene okazis la solena inaŭguro kun alparoloj de la urbestro, de *Prof. D-ro Hideo Yagi*, vicprezidanto de UEA, de la prez. de LKK kaj aliaj eminentuloj. Ĉeestis 1700 s-anoj el 40 landoj.

F-ino M. Vermaas laŭtlegis envenintajn telegramojn kaj leterojn; sekvis salutoj de la reprezentantoj de Registaroj kaj Landaj Asocioj.

En brila festparolado *D-ro Ivo Lapenna* laŭdis la fervoran, ageman, britan esperantistaron, skizis la evoluon de nia movado, la kunlaboron kun la projektoj de *UNESKO*, la klopodojn por proksimigi la popolojn, starigi pacon en la mondo, kio instigis pli ol 70 sciencistojn, politikajn gvidantojn ktp. el 17 landoj, kandidatigi UEA, kiel reprezentanton de la tutmonda E-movado, por la Nobel-Pac-Premio. Li instigis al bona propagando por Esperanto kaj petis la esperantistaron, nepre uzi nian lingvon en ĉiuj lokaj kaj landaj kunvenoj, por ke ankaŭ la komencantoj havu la okazon, perfekte lerni ĝin paroli. Li alvokis al harmonia kunlaboro sur internacia, landa kaj loka niveloj, helpante unu la aliajn, por antaŭeniri ĉiam pli firme kaj per ĉiam pli grandaj paŝoj de unu venko al alia, ĝis ni atingos la finan celon: la enkondukon de la vivanta, alte evoluinta Internacia Lingvo en ĉiujn internaciajn rilatojn.

En la kadro de la *INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO* prelegis:

Prof. Gaston Waringhien pri la temo: „*Kien la arto?*” Li pritraktis la diversajn konceptojn de literaturo kaj pentroarto kaj la koncernajn artistojn. Ĉeestis 95 personoj. *Prof. D-ro I. Lapenna* pri „*La Parolarto en la Internacia Lingvo*”; li speciale emfazis la gravecon de preparo al eĉ mallonga parolado kaj de absolute korekta kaj klara prononcado. Aŭskultis ĉ. 800 personoj.

Mag. W. Auld parolis antaŭ 200 personoj pri „*La Evoluo de la Esperanta Poezio*”; *Lic. Tibor Sekelj* pri „*Artoj en Afriko*”; *Prof. D-ro H. Yagi* pri „*Esenco de la Japana Arto*”.

En la kadro de la *ARTA FESTIVALO* oni prezentis *diversajn kolorfilmojn*, inter kiuj 2 kun sonkomentarioj en Esperanto; por la aliaj oni donis la eksplikojn dum la daŭro de la filmoj; okazis *Jugoslaviaj folkloraj dancoj*, prezentitaj de la kulturarta societo „*Branko Cvetkovic*” el *Belgrado*; *Muzika Vespero* de la Junulara Kanthoro el *Ljubljana*; *Horeto de Poezio* kiun prezidis *Prof. Waringhien*; *Renkonto kun la Eterna Beethoven*: lumbilda prelego kun muzika akompano de la pianisto *R. Dupuis*. *Arto kaj Vivo* sub gvido de s-ro *Roland Dupuis* estis bela programo en kiu partoprenis 29 personoj plus granda ĥoro. En *Oratoria Konkurso* sub prezido de *Prof. Waringhien* partoprenis 9 kandidatoj; la premiojn gajnis: 1. *Humphrey Tonkin*, *Anglujo* pro la temo „*Dezirata rolo de la junularo en la Movado*”; 2. *Eliza Weide*, *Germanujo* kaj 3. *Guiliano Turone*, *Italujo*, ambaŭ pro la temo „*En kiu senco arto estas internacia?*”

En la *Belarta Konkurso* partoprenis 12 aŭtoroj el 9 landoj.

De la *Internacia Arta Teatro* estis prezentataj jenaj unuaktaj teatraĵoj:
„*La Homa Voĉo*“; stranga monologo de la franca aŭtoro *Cocteau*;
„*Advokato Patleno*“, farso de nekonata aktoro el la XVa jarcento;
„*La respektinda Prostitulino*“ de *J. P. Sartre*, kiu pritraktas la problemon de la rasismo. *Londona amatora trupo* ludis „Okuni kaj Gohei“, japanan dramon, kaj „*La Urso*“, farson de *Ĉeĥov*.

Laŭ la oficiala raporto de la LKK oni ludis bonege, kaj ni ne pridubas tion; tamen ni ricevis plendojn de ĉeestintoj:

Pri „*Advokato Patleno*“: Kiel oni povis atendi ĝi estis iom kruda; dum la paroloj la aktoroj faris blafeme la Krucsignon kaj uzis la nomojn de sankta Petro kaj aliaj sanktuloj. Multaj kristanoj, protestantoj kaj katolikoj, opinias ĝin insultema... „*Neŭtrala*“ Asocio, kiu havas inter siaj membroj homojn de ĉiuj konfesoj kaj politikaj konceptoj, nepre devas zorgi, ke neniu povas esti ŝokita de kio ajn tiu Asocio publikigas, en siaj eldonoj, en prelegoj kaj kunvenoj, kaj sur la scenejo dum kongresoj. Malfacila tasko, sed nia opinie nepre deviga! Pri „*La respektinda P...*“ brita samideano skribis, ke jam antaŭ la prezento, kiam la anglaj ĵurnaloj publikigis ĝin en la listo de prezentotaj teatraĵoj, neesperantistoj mirigite demandis lin, ĉu la esperantistoj do havas intereson por tiaj aferoj? Vere tio ne estas propagando, kontraŭe tio povas esti kaŭzo, ke multaj personoj havos tute neĝustan ideon pri nia movado kaj ties adeptoj. Cetere en la kritiko de s-ro *André Cherpillod* (en la oficiala kongresraporto) ni legas: „Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri aferoj aktualaj, havis la devon varme aplaŭdi tiun verkon, eĉ se kelkaj esprimoj (tamen mildigitaj per la esperanta traduko) iom ŝokis orelojn ĉastafektajn.“

Ĉu oni vere ne povas trovi teatraĵojn, kiuj ŝokas neniun? Tiuj ne bezonas esti tedaj, pezaj aŭ tre seriozaj, eĉ povas esti gajaj ŝercoj, nuraj amuzajoj!

S-ro *W. Auld* plendis, ke ĉeestis malpli ol kvarono de la kongresanaro kaj citas la verdikton de D-ro *Lapenna*: „Se la esperantistoj ne scias ĝuste taski la kulturajn valorojn kreitajn en Esperanto, ili fine sukcesos pereigi nian aferon. Se per sia indiferenteco ili senkuraĝigos tiujn s-anojn, kiuj dediĉas elstarajn talentojn al plivalorigo de la internacia afero, tiaj homoj nin baldaŭ forlasos, kaj Esperanto estos tiom pli malriĉa...“

Ni tamen opinias, ke oni ne ĉeestas teatraĵojn aŭ legas librojn, nur ĉar ili estas verkitaj en Esperanto, eĉ de eminentaj kaj famaj esperantistoj, sed ke ankaŭ la enhavo ludas rolon, same kiel oni faras sian elekton sur naciaj terenoj. Ekzemplo estas la prelego de D-ro *Lapenna* pri la parolarto, kiun ĉeestis 800 personoj: ili sciis ke valoros la penon, aŭskulti lin kaj tial venis. Oni ne povas atendi, ke la publiko ĉeestos teatraĵon kies priskribo ne allogas, aŭ pri kio ni eĉ scias ke ĝi ne estas interesa aŭ ke ĝi ŝokos niajn konceptojn pri religio aŭ moralo!

En la 6-a INTERNACIA INFANA KONGRESETO partoprenis 36 infanoj el 9 landoj. Ili aranĝis ekspozicion de infandeseĝnaĵoj, bazaron kun ludoj kaj vendoj (vizitis ĝin 300-400 personoj); ili prezentis kantojn, muzikojn, dancojn kaj teatraĵetojn.

El la multaj kunvenoj ni nur povas nomi kelkajn:

Kristana Esperanto-Ligo Internacia havis kiel temon: „Aktualaj problemoj en la mondo.“ Oni diskutis pri: 1. Kian valoron havas kristanismo en la nuna tempo? 2. Kion kristanoj komprenas sub la vorto „*Libereco*“? 3. Kiamaniere KELI povus enpenetri en kristanajn rondojn? 4. Kion oni pensas pri la rasa problemoj?

Pri la IKUE-diservo kaj kunveno ni jam raportis en la septembra numero de E.K. Plue havis siajn kunvenojn la *Blinduloj, Studentoj, Ĵurnalistoj, Instruistoj, Juristoj, Kuracistoj, Sciencistoj, Arkitektoj kaj Konstruistoj, Fervojistoj, Skoltoj, Int. Geografia Asocio, la Vcterana Esp. Klubo, ktp. ktp.*

La *Cseh-Seminario* por eduki kursgvidantojn laŭ la Cseh-metodo havis 76 partoprenantojn. La *Komisiono por la lerneja kompanjo* komunikis ke du landoj, nome *Pollando* kaj *Jugoslavio*, estas pretaj por internacia konvencio. Oni bezonas ankoraŭ tri landojn; taŭgaj eblecoj ekzistas en *Brazilo, Novzelando, Svedujo, Danujo, Finnlando* kaj *Islando*. Reprezentanto de la pola registaro vizitos la koncernajn aŭtoritatulojn en tiuj landoj.

Oni konstatis ke Esperanto estas instruata en 600 lernejoj de 27 landoj al 20.000 lernantoj. Plej bonajn rezultatojn atingis niaj polaj kaj jugoslaviaj samideanoj.

La *Eŭropa Lingvo-Kampanjo* sub prezido de *D-ro Hermann*, raportis pri sia laboro, precipe post la fiasko de la angla-franca dulingvisma movado. Oni daŭrigos la kampanjon per taŭga informado al edukministroj, uzante la rezultatojn de la Lerneja Kampanjo.

La *Seminario „Oriento kaj Okcidento”*, kiu celas la alproksimiĝon de ambaŭ „mondpartoj”, en kunlaboro kun la UNESKO, okazis de 2-4 aŭgusto en Londono. Partoprenis 50 personoj el kvar kontinentoj.

Oni aranĝis diversajn ekspoziciojn, okazis la tradiciaj bankedo kaj balo; el la ekskursoj ni nur nomu du malgrandajn, sed tre specialajn: Speleologian Kavernan Esploron en groto 25 km de la kongresurbo, kaj viziton de la esp. kuracistoj al brita hospitalo.

Post la morto de *Prof. D-ro Canuto* oni ankoraŭ ne elektis novan prezidanton de UEA. Anstataŭa prezidanto estis *s-ro Holmes*, kaj oni decidis provizore ne ŝanĝi la situacion.

Pro ekŝiĝo de *s-ro Fighiera* la estraro nomis *konstanta kongres-sekretario* s-ron *Pompilio*, kiu jam 4 jarojn funkciis en la Centra Oficejo de U.E.A. en Rotterdam. La *47-a Universala Kongreso de U.E.A.* okazos en aŭgusto 1962, en *Kopenhago, Danujo*.

KONGRESA REZOLUCIO

La 46-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 5-a ĝis la 12-a aŭgusto en Harrogate en la ĉeesto de 1700 reprezentantoj el 35 landoj:

Konstatas kun aprobo, ke la Unua Internacia Arta Festivalo pliriĉigis la internacilingvan kulturon kaj, kune kun la Seminario „Oriento-Okcidento” en Londono, donis novan apogon al la celoj de UNESKO;

Notas, ke, rezulte de la Rezolucio de la Varsovia Kongreso kaj la decido de la Komitato de Universala Esperanto-Asocio de la 15-a de decembro, 1959, paralele kun la daŭra grandiĝo de la kulturaj valoroj kreaĵoj en Esperanto, jam konsiderinde vastiĝis la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj; Kaj, sekve, esprimas la opinion, ke maturiĝis la kondiĉoj por subskribo de Interŝtata Konvencio pri la laŭgrada paralela enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj por instruistajn kolegiojn de pluraj ŝtatoj.

Tial la Kongreso rekomendas al la gvidaj instancoj de Universala Esperanto-Asocio daŭrigi kaj intensigi la agadon por realigo de tiu celo.

Impresoj kaj travivaĵoj okaze de nia vojaĝo al la XIIIa IFEF-kongreso en Barcelono kaj nia restado en Zaragozo.

II

Se la unua parto de nia vojaĝo al Hispanujo estis granda okazaĵo por ni, ĉar ni povis ĝui kune kun esperantistoj el dek kvar landoj de Eŭropo la belecon de la lando kaj la gastamon de ĝiaj loĝantoj, la dua parto estis ne malpli alloga kaj riĉa je travivaĵoj.

La vojaĝo al Zaragozo tra la romantika iberia antaŭmontaro estis travivaĵo de aparta karaktero pro la tipa hispana pejzaĝo. Okaze de la Eŭkaristia Mondkongreso, la pasintan jaron en Munkeno ni interkonatiĝis kun hispanoj el Zaragozo, kiuj invitis nin, iufoje veni tien. Ni uzis la okazon veturi post la Esperantokongreso al Zaragozo. La akcepto ĉe niaj hispanaj amikoj estis tre kora kaj ni sentis nin tuj kiel hejme. Evidente ili klopodis aranĝi nian restadon tiel agrabla kiel eble. La unuajn tagojn ni pasigis per vizitoj al la plej grandaj vidindaĵoj: preĝejo de nia kara Sinjorino *Maria Pilar*, katedralo, urbmuzeo, urbparko ktp. Niaj hispanaj amikoj entreprenis kun ni dimanĉe, ekskurson al la *Monasterio de Piedra* (ŝtonmonaĥejo), kiu donis al ni ĝis nun ne viditan, unikan travivaĵon. Estas neeble, esprimi per vortoj la anigon al la familio de niaj amikoj kaj la tutan atmosferon dum nia restado. Ĝi estis kora, aminda, babilema, gaja, amuzema, atenta, helpema, ĝi estis tiel kiel ĝin karakterizis Dro Herrero en sia entuziasmiga festparolado: Hispanujo, la lando de la suno, de la varmo, de la floroj, de la muziko, de la poezio, de la vivmaniero, estis intimigata al ni, kortuŝis nin. En la estonto ni dezirus nomi ĝin nia dua hejmlando. Ankaŭ in Z. ni konstatis, ke Esperanto vivas en vigla grupo, kie ni estis tre kore akceptataj. Eĉ dum nia dimanĉa ekskurso ni estis alparolataj esperantlingve. La belegaj kaj neforgeseblaj tagoj en Z. ĉarme estis finataj per la vizito al folkloro vespero kun ravantaj popoldancoj kaj popolkantoj el Aragonio.

La adiaŭo ne estis facila por ni.

Senĉese sonoros la kanto en niaj oreloj:

„Malproksime en la sudo, la bela Hispanujo, Hispanujo estas mia hejmlando...”

* * *

La XIIIa IFEF-kongreso kaj nia vojaĝo al Zaragozo okazis en la tempo de Pentekosto. Dio denove sendu sian Sanktan Spiriton kaj metu pensojn de la paco en ĉiujn korojn kaj revivigu la sopiron al paca interkompreniĝo de la popoloj. Praktika kaj valora helpilo al ĉi tiu interkompreniĝo estus sendube la ĝenerala enkonduko de Esperanto kiel dua lingvo en la lernejoj. Certe estas materia helpo necesa por la neevoluintaj landoj. Spirite neevoluintaj estas ankaŭ ĉiuj tiuj, kiuj povas paroli nur unu lingvon kaj ne povas interkompreniĝi kun la anoj de alia popolo. En la atomepoko, sub la signo de la teknika progreso pli kaj pli proksimiĝas la landoj kaj la popoloj. La distancoj ne plu gravas. La homo, ankaŭ la simpla viro kaj la virino el la popolo, ne vivas sole de pano. Li havas ankaŭ spiritajn interesojn. Li ne nur volas partopreni en la kulturposedaĵoj de la nacio, sed ankaŭ en tiuj de la homaro. Kresku en la subaj tavoloj de la popoloj la sento por spiritaj interesoj, enradikiĝu pli kaj pli en la supraj tavoloj la sento por egaliganta justeco kaj helpemo, maturiĝu la komprenemo en la regantoj de ĉiuj popoloj, por ke estu bonstato komuna la plej supra leĝo ne nur por ilia propra popolo, sed ankaŭ por ĉiuj popoloj. Esperanto, la ponto al pli bona, al pli feliĉa mondo!

Markus Behr, Munkeno.

KVAR POEMOJ DE LA FLANDRA AŬTORO
FELIX TIMMERMANS
(1886 - 1947)

— — —

La kern' de l'ajoj estas
senfina kaj sen bru'.
Nur aĵoj kantas, restas
kant' nia povra ĝu'.

En peza nostalgi'
la sangokant' malhelas.
Pluvarkojn mi laŭvelas
al la silent' de Di'.

* *

Majnokta am' al najtingal',
Ho ora kant', lingv' el kristal',
juvelo de l'vesperoj.
Jen estas kvazaŭ haltas hor',
kvazaŭ senpova iri for
pro perlaĵ malliberoj.

La noktanima dankodon'
trakantas vin, vi fluto, son'
de ĝia refrenondo;
ne mankas al ĝi nek orgen',
nek klarion', ĉar estas mem
vi ĝia preĝa fonto.

Ho nobla kant', ho harmoni',
libera estu nun al mi
sen teraj ligoj ebla,
kantigi Dion per la pur'
de la radio stela nur
tra mia lingvo febla.

* *

Folioj falas tra la griz' nebula,
jam estas plu nek sonoj, nek refren',
en seka kano pio nur murmura:
jen tempo por rigardi en si mem.

Malriĉaj, ni l'pasinton rode mordas
kaj ludas per la kartoĵ de ĉagren'.
Fabel' plej bela koron ne agordas
kaj ne plu logas l'estonteca ven'.

La vivo for: nur cindro en la mano...
Sopiras ni al kuna brulpere',
sed al ni restas tamen unu flamo,

somere forgesita, en hejmv'e':
la lum' por kiu, ho domaĝa dramo,
ni nur dum vintro serĉas pri ole'.

* *

Aŭtuno kornoblovas;
incensas l'arbustar';
la frukt' brilŝovas.
Trankviloj teksas gobelinojn
brokatajn tra l'arbar',
kaj cervoj mire ekaperas
el frambujetoj, filikar';
gracie jam preteras...
De arb' al arbo revas bel',

sed ĉiu belo efemeris,
ĉar estas ĝi nur revopel',
sed l'Eterneco, Vi!
Mi dankas pro ĉi nostalgi';
Vi ĝiajn fruktojn benas.
Anasoj triangule venas:
anonc' de l'vintra prem'.
Mi aŭdas: Vi tra l'koro, kano ĝemas.
Mi pretas jen.

— — —

El „Adaĝio”,
tradukis el nederlanda lingvo:
Hector Vermuyten.

Marie Holková:

HIMNO

Ĉio, kion ni trovas antaŭ pordegoj de Foriro
indas je amado:
homo, urbo, floro, birdo,
ĝojo kaj dolor' de l'koro.
Kiel brakum' infana arde premas la ludilojn
de amata Patro donacitajn,
tiel mi ĝojas pri la karusel' de vivo.
Mi scias, foje elfalos la ludiloj,
kiam al Donacinto manojn mi etendos,
ke mem infanon sian Li brakumu.

Ĉio, kio plenigas bonan vivon
estas almozo Dia.
Hundido blinda estas homo,
alsuĉa al la mam' patrina,
kiun li ne vidas,
kiun li kontestas,
al kiu li blasfemas,
kiu lin amplene satigas.

Venas la Mastro Mort',
malfermas vidon al animo,
por ke ĝi vidu,
por ke ĝi timu,
por ke ĝi laŭdu,
por ke ĝi amu eterne la Fonton de Vivo.

Ĉio, kion per blindaj okuloj ni vidas malbonan kaj doloran,
per amo eblas refandi je interna belo.
Eterna estas la gloro de la vivo.
Eterna estas Dio.

El la ĉeĥa tradukis: Jiri Korínek

Ĉu tio helpas la pacon?

Ĉiuj Amerikanoj estas krimuloj,
la Poloj estas ŝtelemaj,
la Bulgaroj malbonodoras,
ĉiuj Francoj estas anarkistoj,
neniu Italo estas fidinda,
Kroatoj monon defraŭdas,
ĉiuj Rusoj estas ateismaj. —
Tio ja estas neniel vera.
Sed ĉiam tiel parolaĉas homoj,
kiuj kredas certe tion scii.
Ĉu vi opinias, ke tio helpas la pacon? — — —

(el: Pallottiner Kalender 1962)

PAROLAS LA LEGANTO

ESPERANTIGITAJ URBNOMOJ

Bonvolu kiel eble plej multe publikigi pri nia venonta kongresejo, ĉar certe multaj, same kiel mi, intencas partopreni. Krom novaĵoj por aŭtomobilistoj, tendumontoj ktp. interesas ĉio pri la lando kaj la urbo Roma mem. Bonvolu ĉiam uzi la verajn, naciajn nomojn kaj ankaŭ *ne* esperantigu la urbnomojn, por ke ni lernu la verajn nomojn. Mi ofte spertis, ke estas grava malhelpo, se en eksterlando oni ne konas la ĝustajn nomojn. Esperantigitaj nomoj estas senvalora sensencaĵo kaj multe konfuzas! Se mi ekzemple esperantigus mian adreson, mi verŝajne neniam ricevus respondon je mia anonceto kaj eĉ ne ricevus E. K.

Klemens Lamby, Mülheim-Ruhr, Germanujo.

Noto de la Redakcio:

Ni ne povas tute samopinii kun la verkinto, ke „esperantigitaj nomoj estas senvalora sensencaĵo“! Esperantigo povas esti utila kaj eĉ necesa, se temas pri lokoj kun internacia graveco. Tial la ĉefurboj de la landoj kaj la mondfamaj lokoj el katolika vidpunkto, kiel Romo, Lurdo, Fatimo ekzistu en Esperanto. La verkinto pravas, ke oni krome sciu la naciajn nomojn kaj uzu tiujn sur leteroj.

La ensendita artikolo „Agendo por Praktikaj Esperantistoj“ (p. 153) vekis gravan kritikon; ĉi tiu rubriko ja speciale estas tribunio por la Legantoj kaj do mi publikigos la diversajn rimarkojn; tamen la ensendintoj devas iom atendi, ĉar iliaj leteroj venis post la fermdato (la 10-a de ĉiu monato), krome estas skribitaj permane, — unu eĉ tre malfacile deĉifrebla — kaj mankis al mi la tempo por transskribi ilin. Mi denove urĝe petas al ĉiuj ensendantoj de artikoloj: nepre atentu la Dekalagon por Verkantoj, p. 83.

VEKIGU!

Sur la unua paĝo de nia E.K. regule aperas la instigaj kaj modeste plendaj frazoj de nia nelacigebla kaj entuziasma sekretariino, kvazaŭ malesperanta pepado de birdopatrineto, kies idoj facilanime vagadas en la danĝera kirlado de la vivo.

Ĉu ĉiu legas ilin? Ĉu ĉiu finlegas kaj meditas iom pri ilia enhavo?

Mi tre ŝatus esperi, ke *ne!* Alie ĉiu devus senti la sinceran zorgemon, kiu diktas la esperige tristajn vortojn! Alie mi devus malesperi, spertante la senliman indiferentecon, eĉ senkonsciencan, kiujn nia jarlibro pruvas.

En la jaro 1960 devis esti strekitaj pro „kelkjara ŝuldo“: 266; en 1961: 40 membroj. Ili eĉ ne sentis la devon almenaŭ sciigi, ke ili ne plu intencas pagi la kotizon. Ili senkonsciencie lasis, ke la administranto superflue penadu (kaj pagu la afrankojn de admonaj leteroj!) pro ilia neglektemo kaj avareco! Ili faris malutilon al IKUE de preskaŭ (306x18) 5500.— guldenoj! Ĉu ili kuraĝas sin nomi katolikoj? Ĉu ili neniam konfesas? Kaj se ne, ĉu ili vespere neniam esploras sian konsciencan, ĉu iliaj dumtagaj agoj estis neriproĉindaj? estis honestaj? Se ne, ili ne meritas la titolon: homo! Tiaj individuoj, kiuj estas tiel nesolidaraj kun samreligianoj, reciproke ankaŭ ne meritas indulgon. Mi proponas al la kompetentulino, ke ŝi en nia gazeto per okulfrape grandaj kaj dikliteraj admonvortoj alvoku la jam strekitajn eksmembrojn, ke ili pagu siajn ŝuldojn. En la sekvonta numero ŝi komencu publikigi la adresojn de la ŝuldantoj, samtempe petante la membrojn, ke en privata letero ankaŭ ili klarigu al la koncernatoj,

kiel ne homa, eĉ kiel ne honesta estas ilia konduto, per kiu ili faras malutilon al IKUE kaj al siaj homfratoj.

Kvankam ne povas esti direkte riproĉinda, tamen estas tre bedaŭrinda simptomo la ekŝiĝo. (45+79) Konsiderante la malaltan kotizon, apenaŭ estas kaŭzo akceptebla por ekŝiĝi. Oni devas supozi, ke ĉiu klera homo komprenas kaj laŭmerite taksas la valoron de Esperanto — kiel helpilon — en la Eklezio, sed kiu tamen ne kapablas tion kompreni, kiel katoliko povas kaj devas fidi al la ĝustaj juĝkapabloj de la Papoj, kiuj probable ne senpripense benis nian movadon. La ne aliĝo al nia movado estas pardonebla nur al tiuj, kiuj ne konas ĝin, sed la ekŝiĝo estas tute ne, — neniokaze, — pardonebla! Estus tre interese enketi ĉe la ekŝiĝintoj pri iliaj kialoj, se nia administranto ne estus tiel troŝarĝita. Tamen eble troviĝos kelkaj oferemuloj, kiuj estos pretaj presigi kaj dissendi la necesajn demandajn poŝtkartojn. Temas ne nur pri scivolemo! Nepre ni povos utiligi la respondojn ĉe la plua konstrulaboro. Mi esperas, ke mia sugesto ne restos sen rezulto.

Estas ankoraŭ preparolinda la plej grava, plej ĉefa problemo: la malkreskado de nia membraro. La supre menciitaj du bedaŭrindaj simptomoj estas nur hontendaj makuloj, sed temas pri vivo aŭ pere!

La fakto, ke la nombro de novaj membroj (1957-1959 = 683; 1960-1961 = 155) ne atingis la nombron de ekŝiĝintoj kaj mortintoj, estas ne nur tre bedaŭrinda, sed vere malesperiga! En la lasta jaro nia membraro malkreskis! (55)

Tiu problemo estas tiel grava, ke mi intencas en aparta artikolo pritrakti ĝin.

I.K. Kovarcz, PF. 212, Lund, Svedujo.

LINGVA KAMPANJO INTER LA KATOLIKA JUNULARO

„Disvastigo de Esperanto inter la junularo” estis la temo de la 17-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) en *Wokingham, Anglujo*, de 12 - 19.8.61. Dum la katolika fakkunveno de la 46-a Universala Kongreso en *Harrogate* estis proponita „Lingva Kampanjo inter la Katolika Junularo”. Celo de tiu projekto estas la grandskala enkonduko de Esperanto en la katolikajn junularorganizojn diverslandajn. La planitaj paŝoj estas jenaj:

1. Kreado de internacia komitato de kunlaborantoj, kiuj aŭ estu gvidantoj resp. aktivaj membroj de iu katolika junulargrupo aŭ havu bonajn rilatojn kun tia organizo. La tasko de la komitatoj estas, propagandi Esperanton koncentrite en unu aŭ pluraj grupoj de iliaj lokoj. En kelkaj landoj samtempe organizitaj Esperantokursoj — laŭ eble komencotaj dum la venonta novembro! — ebligu jam eble je Kristnasko facilan interkorespondadon kaj iom post iom ĝemeliĝon de la diverslandaj grupoj katolikaj. Plue la kursoj celu, ke unuopaj aŭ eĉ pli bone tutaj grupoj jam povos partopreni la 29-an Kongreson de IKUE venontjare apud *Romo* en la Internacia Centro „Por pli bona mondo”.
2. La komitato klopodos atentigi la katolikan mondon pri la atingita rezulto de la nur unujara lingva kampanjo. Tio okazu per invito de katolikaj funkciuloj al la IKUE-Kongreso kaj per vasta informado de la internacia katolika gazetaro.
3. La komitato provos interesigi la landajn estrarojn de la Junulara Movado Katolika eksplikante la ĵus sukcese efektivigitan eksperimentan enkondukon de Esperanto en kelkajn katolikajn junulargrupojn diversnaciajn. Oni instigos la landajn estrarojn decidi, samtempe publikigi Esperanto-kursojn en la oficialaj organoj de pluraj landaj asocioj katolikjunularaj, por ke la tuta katolika junularo en tiuj landoj lernu la Internacian Lingvon kaj ĝin uzu en la internaciaj rilatoj.

4. La Tutmonda Katolika Junularo apliku Esperanton kiel internacian komprenilon konsiderinte la atingaĵojn pere de la unuaj tri paŝoj de la „Lingva Kampanjo inter la Katolika Junularo”. Por atingi la finan celon de la kampanjo estas bezonataj la plenaj fortoj de multaj aktivaj kunlaborantoj kaj verŝajne kelkajara klopodado. Certe ĉiu esperantista katoliko konsentas, ke la tasko de la kunlaborantoj estas bela kaj bona. Ĉu ne ankaŭ vi — ĉu juna aŭ plenkreska aktivulo — volas kunhelpi en nia lingva kampanjo? Jam kelkaj gekunlaborantoj el diversaj landoj aliĝis kaj eklaboris! Se vi emas kaj kapablas kunlabori bonvolu turni vin se eble baldaŭ al:

Karl-Ernst Salzmann, Haus der katholischen Jugend, *FRANKFURT/MAIN*, Unterweg 12-14, Germanujo.

Mondfirmo eldonas Esperanto-Katalogon

Pasintjare la Esperanto-gazetaro (E.K. 1960, 65) faris alvokon, sendi adresojn de esperantistaj medicinistoj al Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstr. 172, *Den Haag, Nederlando*, kiu kompilos adresaron laŭ peto de la *Sekcio Medicinaj Aparatoj de Philips, Eindhoven*. En junio 1961 s-ro *E. L. M. Wensing*, direktoro de la nomita Sekcio, mem jam de jardekoj bonega esperantisto, sendis esperantlingvan leteron al „La Praktiko”, en kiu li komunikas, ke la centoj da leteroj kaj miloj da adresoj kiujn ensendis la fervoraj samideanoj, decidigis la direkcion de la ĝenerala propaganda departemento de Philips, doni sian konsenton por publikigo de kolektiva katalogo en Esperanto pri la produktoj de la Sekcio Medicinaj Aparatoj. La redakcio de „La Praktiko” promesis prizorgi la faksperitan tradukon de la katalogo. S-ro Wensing dankas al ciuj, kiuj helpis por sukcesigi la kolektadon de la adresoj. Pluajn adresojn volonte akceptos la Int. Esp. Inst.

Ni gratulas

Naskiĝis en junio pasinta *Irene Gertrude*, filineto de *Heinrich kaj Martha Reiter Kocher*, Von der Nüllgasse 100.10.15, *Wien X, Aŭstrujo*. Korajn gratulojn al la feliĉaj gepatroj kaj ilia fileto *Roland*. *

La 2-an de septembro geedziĝis *D-ro Charpentier* kaj f-ino *Thérèse Olivaux*, filino de nia fervora, multjara membro s-ro *Robert Olivaux*. Korajn gratulojn al la parencoj kaj sincerajn bondezirojn por feliĉa vivovjo al la juna paro. *
Resp. Frato Cornélio van Lierop SCJ, Seminário Christo Rei, C.P.761, *Recife, Pe. Brazilo*, fervora esperantisto kaj IKUE-membro, ricevos la sanktan Ordinon 26.11.1961. Korajn gratulojn al nia nederlanda samideano, kiu malproksime de siaj gepatroj, parencoj kaj patrujo travivos la plej belan tagon de sia vivo. Ni preĝu por ke Dio riĉe benu lin kaj lian estontan misiistan laboron. *

TRADUKOJ EN 1958

En 1958 Sovet-Unio eldonis la plej multajn tradukojn: entute 4.457 en siaj diversaj lingvoj. Poste sekvis Germanujo (Federacia kaj Demokrata Respublikoj) kun 2.512 kaj Ĉeĥoslovakujo kun 1.462 tradukoj. El la 29.209 tradukitaj verkoj 9.675 estis tradukitaj el la angla lingvo, 4.320 el la rusa, 4.010 el la franca kaj 2.951 el la germana.

Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Inĝormservo

NI FUNEBRAS

La 4-an de aŭgusto 1961 forpasis nia fervora, tre simpatia membro, s-ro *Valentino Alavedra*, S. Antonio 38, *Tarrasa (Barcelona) Hispanujo*. Al lia familio ni esprimas niajn korajn kondolencojn. *

En la aĝo de 71 jaroj mortis 1.9.61 post mallonga malsano, s-ro *Hendriko J. F. Wansink*, Walburgisplein 6, *Arnhem, Nederlando*. Li estis afabla, helpema homo, IKUE-ano de post multaj jaroj. Oni kelkfoje povis legi liajn poemojn en E.K. Al s-ino Wansink kaj infanoj ni kore kondolencas. *

Atingis nin la sciigo, ke 17.8.61 mortis *Patro Francisko Zsiros S.J.* en la monaĥejo *Pannonhalma, en Gyórszentmárton*, (Monto de sankta Marteno) *Hungarujo*. Li estis la ĉefa organizanto de la *I-a Eŭkaristia Esperantista Mondkunveno*, kiu okazis en *Budapest* en la jaro 1938. Post la enterigo s-ano *Andreo Bozo* metis verdan kronon kun esperantlingva surskribo sur la tombon. Ni rekomendas la animojn de niaj mortintoj en la preĝoj kaj s. mesoj de niaj membroj.

HANS BERNHARD †

Honorofica sekretario de la Katolika Esperanto - Centro en Germanujo

La Sinjoro super vivo kaj morto forprenis la 8-an de septembro 1961 nian karan samcelanon *Hans Bernhard* el tiu ĉi mondo en lia 59-a vivjaro! Ne-atendite li mortis dum sia deĵorado kiel asekurecificisto pro koratako.

Lia forpaso estas grandega doloro por lia edzino kaj por lia 11-jara filo Hansi, kiu estas denaska Esperantisto. Ni kundoloras kun la familio kaj esprimas nian plej profundan kondolencan.

Lia forpaso estas grandega perdo por la katolika Esperanto-movado, speciale por la katolika Esperanto-movado en Germanujo. Esperantisto jam ekde la juneco, samcelano *Bernhard* post la milito ege kunlaboris ĉe la restarigo de la katolika Esperanto-movado, kiu dum la 3-a regno estis detruita. Kiam 1947 fondiĝis la Katolika Esperanto-Centro en Germanujo, li tuj transprenis la postenon de sekretario. Dum 14 jaroj, ĝis la tago de sia morto, li plenumis tiun ĉi taskon. Regule li forsendis kun la helpo de la familio la informilon „Semisto”, solvis la financajn problemojn, forsendis flugfoliojn, sendis specialajn raportojn, al katolikaj gazetoj kaj al organizaĵoj pri Esperanto-okazintaĵoj, respondis letere al la multaj alvenintaj demandoj de interesuloj. Li kunhelpis ĉe la organizado de la *4-a Eŭkaristia Esperantista Mondkunveno en Munkeno 1960*. Multajn horojn de la libertempo li oferis por tiuj ĉi laboroj sensalajre, neniam postulante eĉ unu pfenigon. Lerte, gaje, senlace, entuziasme li laboris por la grandaj celoj de nia movado.

La 11-an de septembro estis dum sunbrila vetero la enterigo en la tombejo „Westfriedhof” en München. Florkronojn metis sur la tombon la ĉeestantaj esperantistoj. La verdstela flago kun la blankflava kruco kliniĝis super la tombo. *Sac. prof. L. Thalmaier*, prezidanto de la Katolika Esperanto-Centro de Germanujo, dankis al li pro la farita laboro kaj deziris, ke Dio rekompencu al li, kion li laboris por la unueco de la katolikoj pere de Esperanto. La entombigceremonio finiĝis per la esperantlingva preĝo: „Dio donu al li la eternan kvieton, la eterna lumo brilu super li, la Sinjoro lasu lin ripozi en paco!”

„LETERO EL NIA ĈIELA PATRUJO”
Prediko en la katolika diservo Universala Kongreso 1961
en Harrogate.

En sia letero al la Romanoj skribas la apostolo Paŭlo: „La nevideblaj ecoj de Dio post la kreado de la mondo fariĝis videblaj, nome Lia eterna potenco kaj dieco.” (1,20) Per tiuj ĉi vortoj estas esprimita, ke la kreitaĵo estas vojo al Dio! Sed la plej internajn misterojn de Dio kaj la fincelon de la kreitaĵo ne povas esplori kaj trovi la homa intelekto. Ĉirkaŭ Dio estas kvazaŭ nebulo, kiun ne povas trapenetri la homa okulo. Pro tio la mistero de Dio kaj de la kreitaĵo estus restinta por ĉiam kaŝita al la homaro, se Dio ne estus forpreninta tiun ĉi nebulon, se Li ne estus kliniĝinta en graco al la homaro kaj estus parolinta per la patriarkoj kaj profetoj kaj fine per Sia Filo Jesuo Kristo. Tiu ĉi malkaŝo de misteroj, konataj nur al Dio, nomiĝas revelacio. Tiu ĉi vorto venas de la latina vorto „revelatio”, kies laŭvorta signifo estas „forpreni la vualon”. Dio forprenis kvazaŭ la vualon de Sia vizaĝo kaj nun la homo povas pli klare ekkoni Lin, la homo nun informiĝas pri diversaj misteroj de Dio. La Dia revelacio troviĝas grandparte en la Sanktaj Skribaĵoj, kiuj ĝenerale nomiĝas Biblio. Pro tio la Biblio estas por ni la plej sankta kaj respektinda libro el ĉiuj libroj.

Kiam kaj kiel la Biblio estiĝis?

La revelacioj de Dio estis unue buŝe disvastigitaj per homoj, kiujn Dio speciale komisiis: la patriarkoj, profetoj kaj apostoloj. Sed poste homoj, movataj de la Sankta Spirito, skribe fiksis la plej grandan parton de la Diaj revelacioj. Tiu skribado komencis en la tempo de Moseo (ĉirkaŭ 1300 jarojn antaŭ Kristo) kaj finiĝis ĉ. en la jaro 100, kiam verkis la apostolo Johano, ekzilita sub la regado de la imperiestro Domiciano, sur la rokinsulo Patmo la lastan libron de la Biblio, la Apokalipson. La tuta Biblio ampleksas 72 librojn, la Malnova Testamento 45, la Nova Testamento 27. La originalaj lingvoj de la Malnova Testamento estas la hebrea kaj la greka, la Nova Testamento estas verkita en malnovgreka lingvo. La bibliaj verkistoj estis profetoj kaj reĝoj, ŝafpaŝtistoj kaj kamparuloj, pastroj kaj spertuloj pri leĝoj. Sed ĉiuj estis nur iloj en la mano de Dio. La Sankta Spirito instigis ilin al verkado, protektis ilin kontraŭ eraro. Tiu, Dia instigado kaj protektado nomiĝas inspirado. Sed la senerareco nur ampleksas la purecon de la Dia revelacio! Senerare la bibliaj verkistoj informas nin pri la ecoj de Dio, pri la moralaj postuloj de Dio al la homo, pri la supernaturaj celoj de la homo kaj de la tuta kreitaĵo. La Biblio ne volas esti naturscienca libro, la homa intelekto sen Dia revelacio povas esplori kaj studi kaj eluzi la leĝojn de la videbla mondo. Pro tio ankaŭ ateisto povas trovi novajn natursciencajn leĝojn. La Dia aŭtoro de la Biblio lasis al la verkistoj la personecon, ili povis uzi propran stilon. Tial ni trovas en la Biblio diversajn lingvajn stilojn, ni trovas simplajn frazojn, eĉ lingvajn kaj gramatikajn erarojn, sed ankaŭ perfektan kaj brilantan lingvan stilon. La bibliaj verkistoj povis eĉ erari laŭ naturscienca vidpunkto.

La Biblio tamen estas la plej grava libro de la homaro. Ĉu ni ankoraŭ posedas la originalajn foliojn, sur kiuj skribis la homaj aŭtoroj de la Biblio? Bedaŭrinde ili perdiĝis. La dento de la tempo detruis la papirusajn kaj pergamenajn foliojn, dum militoj kaj persekutadoj estas detruitaj la originaloj. Sed ĉiam denove oni kopiis kaj reskribis zorgeme la sanktajn tekstojn; la Eklezio zorgis pri la enhava pureco de la teksto de la Malnova kaj de la Nova Testamentoj. Dum la jarcentoj disvastiĝis multaj manskribitaj kopioj de la Biblio. Estas speciala scienca okupado la esplorado kaj studado de la manskribitaj bibliaj kopioj el

diversaj epokoj. La rezulto de tiu studado estas: Dank'al la 4000 manskribitaj kopioj ni povas konstati la enhavan purecon de la sankta teksto. Neniu libro el la antikva epoko estas transdonita tiel pura kaj zorgema laŭ enhavo kiel la Biblio!

El la amaso de la bibliaj manuskriptoj estu menciata kopio, kiu troviĝas en la lando de nia nunjara Esperanto-kongreso. En la brita muzeo en Londono troviĝas mondkonata greklingva kopio de la Biblio, la t. n. Codex Sinaiticus t.e. la Sinaja Kodekso. Ĝi estis skribataj sur pergamenaj folioj ĉ. la jaro 350. Tiuj pergamenaj folioj havas interesplenan historion. La germana bibliosciencisto Tischendorf trovis ilin en la jaro 1859 en la biblioteko de la Katarinamonaĥejo, kiu situas sur la duoninsulo Sinajo, je la piedo de la monto, sur kiu Moseo ricevis de Dio la ŝtonajn tabulojn kun la dek ordonoj. La rusortodoksaj monaĥoj, kiuj ne plu komprenis la malnovgrekan lingvon, donacis la valorplenajn pergamenajn foliojn al la rusa caro. Post la revolucio en Ruslando la Sovjetunio vendis la kodekson en la jaro 1933 al Britujo por la granda monsumo de 100.000 anglaj funtoj. La granda monsumo estis kolektata per libervolaj donacoj de la angla popolo.

Kompreneble oni gardas en la brita muzeo en Londono tiun Sinajan Kodekson kiel grandan trezoron. Ĝi troviĝas sub vitra ŝirmilo, proksime ĉiam estas muzea gardisto.

Sed la Biblio mem ne estu objekto destinita por la muzeo! Estas la volo de Dio, ke ĉiuj legu ĝin! Pro tio oni tradukis la sanktajn tekstojn en centojn da lingvoj. Estas ĝojige, ke Zamenhof almenaŭ parton de la Malnova Testamento tradukis en Esperanton. De katolika flanko oni preparas novan tradukon de la Nova Testamento kun eklezia permeso. En la revuo „Espero Katolika” aperas en daŭrigoj tiu nova traduko.

La signifon de la Biblio esprimis trafe kaj precize la granda teologo Aŭgusteno per la vortoj: „La Biblio estas letero el nia ĉiela patrujo!” Ni trapensu tiun ĉi frazon! Do, Dio skribis leteron al Siaj infanoj, kiuj vivas en la ĉera ekzilo, por ke ili ne forgesu Lin kaj por ke ili trovu la vojon al la ĉiela patrujo.

La Kristanoj ĉiam prijuĝis la Bibliion kiel la plej respektindan libron. Tiu ĉi respekto ofte jam montriĝis en la belaj librobindaĵoj kaj ornamaĵoj. En la brita muzeo en Londono, sed ankaŭ en multaj aliaj eŭropaj muzeoj oni povas admiri la artplene faritajn librokovrilojn, sur kiuj estas ofte eburskulptaĵoj, diamantoj kaj juveloj. En la teksto mem troviĝas belaj pentraĵoj. Eĉ oni farbis la pergamenon per purpuro kaj surmetis arĝentajn literojn.

La respekto al la biblia teksto respeguliĝas ankaŭ en nia liturgio. En solena Diservo la diakono incensas la sanktan tekston, apud la diakono staras du messervistoj kun brulantaj kandeloj por esprimi: El la teksto de la evangelio al ni parolas Kristo, la lumo de la mondo.

La vorto de Dio ne restu enŝlosita en la Biblio, ĝi estu legata kaj aŭskultata ĉiam denove! La Biblio ne nur estu dekoracio de la libro-ŝranko. La Biblio estu legata! Kiu regule, eĉ nur kelkajn minutojn ĉiutage, legas el tiu letero de Dio al la homo, pli kaj pli enpenetras en la misteron de Dio, pli kaj pli komprenas la sanktajn celojn de Dio, pli kaj pli rigardas la propran vivon sub la vidpunkto de la eterneco kaj fariĝos imuna kontraŭ materialismo, kiu predikas nur surteran celon de la homo. Kiu sincere legos la Bibliion, trovos konsolon kaj forton en la multaj enigmoj de la vivo.

Ni ree honoru la Bibliion, ni legu ĝin regule, tiam ni trovos en ĝi la vojon al Dio kaj ne mortos en ni la deziro al la eterna, ĉiela patrujo.

L. Thalmaier



49. *Ankoraŭfoje: Tour de France.* (komp. 47). Okazis en Montpellier. La hispana atuteĝo Fernando Manzanegue antaŭ la starto al la tablo, kie la rapidbiciklistoj povas plenigi siajn botelojn per freŝaj trinkaĵoj, transdonis sian kampbotelon por ricevi kafon. Jen venis la krizo! En sia fervoro la verŝisto de kafo iris lavi la botelon en akvujo. La sekvoj estis teruraj! Manzanegue kiu vidis tion nenion povante, eksplodis. Torento da hispanaj insultvortoj elverŝiĝis super la malfeliĉa franco, kiu ne komprenis kion malĝustan li estis farinta. Manzanegue intertempe estis ne konsolebla. Per larĝaj gestoj li substrekis siajn frazojn, en kiuj ĉiufoje revenis preskaŭ neaŭdebla vorteto. Fine kunulo de la

hispano donis savon. Vidante la sceneton li elfosis el sia trikoto plastikan boteleton kaj Manzanegue tion ekvidinte iom trankviliĝis. La mirakla trinkaĵo — kiu estis troviĝinta en lia botelo kaj senplue estis senatente forlavita — singarde verŝiĝis en la kafon; kaj grumblante pri tiom da stulteco Manzanegue foriris. Li ree povis trankvilokore sidiĝi sur sia biciklo. (Rakontis tion Leidse Courant, Ned., 10/7'61; kaj vi rakontu tion al sportuloj!).

50. *La neevitebla interpretisto.* Jen la esenca parto de artikolo en la „Germana Esperanto-Revuo, sendita de samid. fr. Cipriano Bassler o.f.m. de jun. 1961 p. 64...” ke ekz. la ĉefurbestro de Berlino vizitis la Sanktan Patron, kun kiu li duonan horon interparolis, kaj ke nur unu sola alia persono ĉeestis, la neevitebla interpretisto.”

„Antaŭ nur malmulta tempo havis la Kanceliero de la Germana Federacia Respubliko longan interparoladon kun la franca ŝtatgvidanto. La gazetoj diris, ke la du ŝtatestroj iris al la interparolado nur kun siaj interpretistoj. Kia groteska afero! Du famekonataj viroj, reprezentantoj de du grandaj nacioj, reprezentantoj de du „mondlingvoj”, du tre inteligentaj homoj, kiuj certe lernis, dum kelkaj jaroj en superaj lernejoj aŭ universitatoj, la lingvon de la alia, ne povas kompreni unu la alian!”

51. *Hinduĵo havas multajn vizaĝojn.* (el tiel intitolita art. de John. E. Frazer en germ./aŭstr. eldono de Das Beste aus Readers Digest prenis alineon S-ano Klaus Perko:) „La diversaj lingvoj efektive estas disiga elemento en la multspeca hinda ŝtataro. Ili faras el najbaroj malamikojn, ili fremdigas kaj disŝiras; oni eĉ povas diri, ke ili minacas disŝpliti tiun multlingvan landon en babelon de ŝtatoj. En nov. 1955 mi staris sur la ŝtonaj ŝtupoj de la usona vojaĝoficejo en Bombay kaj rigardis, kiel la polico en siaj malhele bluaj uniformjako kaj mallongaj pantalonoj furioze pafis al antaŭiranta amaso de kriantaj, per ŝtonoj kaj bastonegoj minacantaj hindoj. En la sekvanta tumulto minimume 12 personoj estis mortigataj kaj 266 vundataj. — Kaj kial tie hindoj batalis kontraŭ hindoj? Ĉar unu duono de la ŝtato Bombay parolis Marathi kaj la alia Gudŝarati kaj la loĝantaro estis ekmalpaciĝinta pri la antaŭvidita ŝtata novreguligo.

Karaj s-anoj: vi nepre kaj nur sendu tiajn interesaĵojn al paroĥestro

C. A. Ouwendijk, Rijpwetering, Nederlando

Proverb-Enigmo

Serĉu vortojn de 6 literoj.

La komencaj literoj formas proverbon.

- 1. montri malrespekton, malestimon al iu per agoj aŭ vortoj.
- 2. inklina turmenti vivantajn estaĵojn.
- 3. senrajte proprigi al si bienon, povon aŭ titolon.
- 4. arbo.
- 5. honora signo por rekompenci personan meriton.
- 6. bedaŭrinde
- 7. kortuŝo
- 8. ĝojanta pri malfeliĉo, malsukceso de aliaj.
- 9. progresi en rango, en ofico.
- 10. birdo
- 11. spirtubo
- 12. malakcepti, ne konsenti
- 13. kredi
- 14. floro
- 15. speciala vesto de servistoj
- 16. kaŭzi respekton, admiron
- 17. rita vesto, uzata por Diservo.
- 18. molusko kun malgranda konko, kaŝita en ĝia haŭto
- 19. speco de sovaĝa bovo kun dikega kapo.
- 20. forigo el la patrolando.
- 21. metalo
- 22. vasta maro
- 23. iama ora monero
- 24. prepozicio
- 25. solena arma revuo
- 26. profundegaĵo
- 27. necivilizita
- 28. linio de la vizaĝo
- 29. foriri en iun lokon, kie oni estas ŝirmata kontraŭ danĝero
- 30. okulkavo

Li de Jong-Roobeek.

SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO sur p. 162

Horizontale:

A. delikat; maten. B. arumo; amiko. C. kanal; betul. D. trog; almozo. E. aloo; se.
F. leming; rajdi. G. oranĝ; turdo. H. orgeno; ital. I. kolon; nomo. J. alo; oving;
oka. K. ne. L. somer; kalumet. M. apude; amuleto. N. rafan; fakir. O. dronto;
rapida. P. od; pan; tut.

Vertikale:

I. daktilo mansardo. II. erar; ero; leopard. III. luno; marko; mufo. IV. imag;
ingo; cedant. V. kol; anĝelo; rent. VI. alg; nov. VII. tablo; oni; kaf. VIII.
memor; amara. IX. mito; ating; lukan. X. akuz; juto; tulip. XI. tolo; dramo;
merit. XII. sidlok; et; du. XIII. nigre; tomat.



RADIO VARSOVIO elsendas ĉiutage de 16.30 - 17.00 M.E.T. duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 25,06 - 25,28 - 25,42 - 31,01 - 31,45 - 31,50 - 42,11 m. kaj sur meza ondo 249 m. (resp. 11970 - 11865 - 11800 - 9675 - 9540 - 9525 - 7125 - 1205 kc/s). Adreso: *Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Varsovio, Pollando.*

RADIO ROMA Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma (Italujo).

La dissendoj okazas de h. 18.55 ĝis h. 19.10 (M.E.T.).

Ondlongoj: metroj 30.90 = Mc/s. 9.71; 41.24 = Mc/s 7.27; 50.34 = Mc/s 5.96,

Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA;

merkrede: S-ro Luigi MINNAJA; vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

OKTOBRO 1961

3: Tra la literaturo; 4: Kuriero de Esperanto; 6: La spirito de la etruskaj tomboj; 10: Novaĵoj el Italujo; 11: Kuriero de Esperanto; 13: Leterkesto kaj bibliografio; 17: Italaj kanzonoj en Esperanto; 18: Kuriero de Esperanto; 20: Famaj fremdaj virinoj en Italujo: Paolina Bonaparte; 24: Kiel aspektis fizike Jesuo surtere; 25: Kuriero de Esperanto; 27: Latinaj verkistoj: Plinius Junior; 31: Tra Romo: Vatikanaj Ĝardenoj.

RADIO BERN, SVISUJO. Lunde kaj merkrede de 13.20 - 13.30 h., jaŭde kaj sabate de 22.15 - 22.30 h. MET, per la ondoj 31.46 kaj 48.66 m. (9535 kaj 6165 kc/s). Lunde kaj jaŭde parolas d-ro Arthur Baur, merkrede kaj sabate prof. d-ro Edmund Privat.

Aŭskultu la programojn en Esperanto kaj regule skribu al la koncernaj stacioj por danki kaj kuraĝigi al pluaj elsendoj.



* S-ro H. A. Schrandt, Stationssingel 9-b, Rotterdam, Nederlando, deziras korespondi kun samideanoj en ĉiuj landoj de la mondo, pri diversaj temoj. *

Mi deziras korespondi kun misiistoj, por montri al la pastraro de mia loĝloko la valoron de Esperanto. Studprofesoro Kaspar Greifenegger, Feldmaierstr. 14, Pfarrkirchen, Niederbayern, Germanujo. *

Por varbi inter teologi-studentoj ni aranĝas komence de novembro ekspozicion. Amase sendu salutkartojn (ni certe respondos!) al: *Esperanto-Grupo Albertus Magnus*, Bismarckplatz 2, (13a) Regensburg 2, Germanujo. *

La Internacia Katolika Inĝormejo donas senpage informojn al nekatolikoj kaj sendas al ili sian dumonatan revuon „Vojo Vero, Vivo”. La katolikoj bonvolu subteni tiun belan apostolaton per mondonacoj kaj/aŭ abono je V.V.V. kies abonprezo estas 2,50 ned. guld. = 10 steloj jare. Nederlandanoj pagu al la sekretario de I.K.I. Gasthuisstr. 68, TILBURG, poŝtkonto 268507. Por eksterlandanoj la adreso estas: Sac. H. Roosen S.C.J., redaktoro VVV, Huize „St. Gerlach”, HEER (L), Nederlando, poŝtkonto 1036120. Ĉiam indiku por kiu celo via pago estas destinita. La landaj perantoj de I.K.I. kaj eventuale la reprezentantoj de IKUE/E.K. volonte akceptos pagojn.